# *Kuba Prezidento ?eestis ceremonion pro la 60-a datreveno de medicina kunlaboro*



Havano, maj 24  (RHK) Prezidento Miguel Díaz-Canel ?eestis ?i-merkredon  la eventon pro la 60-a datreveno de la medicina kunlaboro de Kubo en la mondo, en kiu partoprenis 605 000 sanprofesiuloj kaj laboristoj en 165 landoj.

La dato estis celebrata ?e la Centra Unuo por Medicina Kunlaboro fare de protagonistoj de tiu humanisma laboro kiu ses jardekojn poste estas konservita kun 57 medicinaj brigadoj formitaj de 22 632 kunlaborantoj deplojitaj sur kvin kontinentoj.

Havano, maj 24  (RHK) Prezidento Miguel Díaz-Canel ?eestis ?i-merkredon  la eventon pro la 60-a datreveno de la medicina kunlaboro de Kubo en la mondo, en kiu partoprenis 605 000 sanprofesiuloj kaj laboristoj en 165 landoj.

La dato estis celebrata ?e la Centra Unuo por Medicina Kunlaboro fare de protagonistoj de tiu humanisma laboro kiu ses jardekojn poste estas konservita kun 57 medicinaj brigadoj formitaj de 22 632

kunlaborantoj deplojitaj sur kvin kontinentoj.

La a 23-an de majo 1963, la unua brigado de kubaj kuracistoj forveturis al Al?erio, kvankam en 1960 malgranda teamo alvenis en ?ilio por helpi post la tertremo kiu skuis tiun sudamerikan landon, kiu konsistigis la unuajn spertojn en la kampo de la saninternaciismo post la triumfo de la Revolucio.

?i tio estas kunlaboro, kiun ne malmultaj klopodas misfamigi per mensogoj kaj distordoj, malgra? la favora bilanco de ?iu solvita sana krizo, savante pli ol ok milionojn da vivoj kaj plenumante preska? 16 mil kirurgiajn intervenojn.

Tie estas la misioj en landoj en milito a? detruitaj de fortaj uraganoj, tertremoj kaj eksplodoj de Ebolo, ?olero kaj la ankora? latenta Covid-19, en kiuj la agado de medicinaj brigadoj kaj la Internacia Kontingento de Kuracistoj Specialigitaj pri Katastrofoj kaj Gravaj Situacioj Epidemioj Henry Reeve, disponigis siajn esencajn servojn.

Fonto:P

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/323574-kuba-prezidento-ceestis-ceremonion-pro-la-60-a-datreveno-de-medicina-kunlaboro](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/323574-kuba-prezidento-ceestis-ceremonion-pro-la-60-a-datreveno-de-medicina-kunlaboro)

RADIO HABANA CUBA

**Radio Habana Cuba**